# Informilo

MONATA REVUO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MAANDBLAD VAN DE VLAAMSE ESPERANTOBOND

VERANTWOORDELIJKE UITGEVER:
RESPONDECA ELDONANTO: Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 Mortsel

JARKOLEKTO
JAARGANG 5 N° 8 - DEC. 1985

LA PREZIDANTO KAJ LA CETERAJ ESTRARANOJ DE FEL PROFITAS ĈI OKAZON

POR DEZIRI AL ĈIUJ MEMBROJ KAJ FAMILIANOJ

AGRABLAJN JARFINAJN FESTOJN

FELIĈON

PROSPERON

SANON

KAJ BONFARTON

POR LA NOVA JARO.

# P R O T O K O L O

pri la estrarkunsido de sabato, la 7a de decembro 1985 en Antverpeno

Gustatempe ĉeestis: Erik D'Hondt (ED), Ivo Durwael (ID) kaj Paul Peeraerts (PP). Poste aldoniĝis Hilde van Ingelgem.
Prezidas: ID
Protokolis: PP
Komenca horo: 10.00 h.

## I A G O R D O

1. Kontrolo de la antaua protokolo: Estas decidite fari la jenajn ŝanĝetojn al la protokolo de la 9a de novembro:
En punkto 3.2 legu "anstataui tiujn du" anst. "anstataui tion".
En punkto 3.3 legu "ili proponis" anst. "ni proponu". La lasta frazo tekstu "ES akceptas kunlabori".
Aldoniĝu punkto 4.5: "ES akceptas kunorienti la studentojn".
En titolo 5. forfalu la vorto "PROPAGANDO".
La fino de punkto estu: "... en aprilo 1986 kaj pretigos sian materialon tiel ke ĝi povus servi ankau por la lingvoborso.
En punkto 6.1.2 legu "ekzamenon por la novaj instruantoj kaj ke ekde tiam ni atentu au reklamu nur pri tiuj novuloj...".

2. Gazetara servo: Herman Deceuninck proponas, ke FEL sendu "Esperanto-Panorama" al la redakcioj de la tagaj gazetoj. Konsentite.

3. Informado: Edward Symoens proponas, ke FEL faru ekspozician panelon kun la diverslingvaj faldfolioj pri Esperanto eldonitaj de Eichholz en Kanado, kaj ke ni monou nelkcentojn de la nederlandlingva versio. La estraro instrukcias al PP mendi po dek de la fremdlingvaj ekzempleroj. Ĝi kredas ke ne estas oportune mendi la nederlandajn grandkvante, ĉar la flugfolioj kiujn FEL eldonis, kaj kiuj ankorau estas haveblaj, havas pli da donitaĵoj interesaj por lokuloj.
Post la alveno de Hilde van Ingelgem montriĝas, ke ŝi posedas kvar ekzemplerojn. PP provizore do ne mendu.

4. Membraro: En la nuna momento aliĝis al FEL 142 membroj (105 en 1984 je la sama momento). La nombro de pagitaj abonoj al Esperanto-Panorama iom regresis al 29.

5. Ekzamena komisiono por instruistoj: Ĉar Petro de Smedt provizore retiriĝis (pro personaj kialoj) de la posteno de gvidanto de la komisiono pri instruado, ID demandos la aliajn komisionanojn pri ilia opinio rilate la daurigon de la taskoj.

6. Obligacioj: PP proponas vendi la obligaciojn en kanadaj dolaroj, pro la daura inflacio. ID informpetos ĉe konato. PP demandos al Maertens kaj poste mem decidos kion vendi kaj kion aĉeti.

7. Venonta kunsido: Momente ankorau ne fiksiĝas dato por la venonta estrarkunsido.



**vlaamse esperantobond**
**flandra esperanto-ligo**

## AKTIVEC-RAPORTO al BEF pri la periodo 1984/1985

1. ENKONDUKO

El ĝenerala vidpunkto, FEL partoprenis en diversaj aranĝoj kiel i.a.
- la Semajno de Internacia Amikeco en Leuven
- la Tri-Landaj Renkontiĝoj
- la Mondkongreso pri Aplikata Lingvistiko en Bruselo (E. Symoens)
- la Markola Kongreso en Bruĝo : 19 - 21 04 1985

Ĝi akceptis en la Esperantodomo en Antverpeno du delegitojn de "Beijing Information" el Pekino akompanataj de kelkaj delegitoj de la asocio "Belgio-Ĉinio"

2. ORGANIZAĴOJ

2.1. La kongreso en Aalst, okazinta de 31.08 ĝis 02 09 1984 estis sukcesa kaj profitdona.
La ĝenerala kaj atentokapta slogano, ilustrita per serio da afiŝoj kaj bildkartoj estis : "Ne krokodilu".
La bildkartoj estas ankoraŭ haveblaj ĉe la libroservo de FEL.
Laŭdinda iniciato estis postkongreseto en formo de distra posttagmezo.
La ĉeftemo de la kongreso estis tiu de la

2.2. Kolokvo "Kiuj estas la kialoj de la stagnado en niaj rangoj kaj kiuj la psikologiaj rimedoj konvinkaj?
Ĉi kolokvo okazis en la sama kongreso.

2.3. Pliaj kolokvoj sekvis : unu en De Pinte, okaze de la FLEJA-semajnfino, dua en Leuven okaze de la SIA.
Se "KLUBO 100" akceptas la kostojn kadre de la Jubilea Jaro, ni povos disponigi la kolokvajn tekstojn senpage, do, je la nuraj afrankokostoj.

2.4. KADROKURSOJ
Kvankam ne okazis kompleta serio da kursoj, la organizado de la kadrokursoj restis kaj restas aktuala.
Cetere, en la UK en Augsburg, FEL estis petata ellabori laborplanon pri internaciaj kadrokursoj.
Ni laboras super tio, sub la gvidado de S-ro E. Symoens.

2.5. ENKETOJ
FEL sekvis la ekzemplon de la Ĉeĥa Esperanto Asocio rilate al la sinteno

de la esperantistaro kaj la kaŭzoj de la membroperdoj k.s.

2.6. Gazetara Servo.

Tiu ĉi servo ekfunkciis, sed ankoraŭ ne atingis la amplekson de la Gazetara Servo en la Franclingva parto de nia lando gvidata de GP

2.7. TURISMO

2.7.1. FEL fondis "Taksi Stop" laŭ la ekzemplo de la ekzistanta asocio "Taxi Stop".
Tio implicas ke por vojaĝoj, ĉefe eksterlandaj ekz. okaze de kongresoj la kostoj povas esti malpliigitaj pere de partopreno en la kostoj je po BF 1,- la kilometron.

2.7.2. FEL ankaŭ kunlaboras kun grava vojaĝ-entrepreno por organizi vojaĝojn, feriojn, loĝadon ktp. ( VTB-VAB)

2.8. TEST 5000

La pasintjara kampanjo TEST 5000, origine iniciatita en Germanio, laŭ kiu Esperanto povas esti studata senpage per la sistemo de ESPERANTO PROGRAMITA, altiris 840 reagojn.
La kamanjo nun denove estas entreprenata.

2.9. LIBROSERVO

FEL transprenis la libroservon de FLEJA kun la interkonsento, ke FEL prizorgas la librovendado en la Esperanto-Centro kaj FLEJA ekster ĝi.
Ni atendas antaŭ longe la reaperon de la vortaro E°-Nl-E° el la Prisma serio.

La respondeculo de la libroservo (Erik D'Hondt) plie iniciatis "per poŝtan libro-aŭkcion" laŭ la ekzemplo de la Sveda Esperanto-Ligo.

Fine, FEL daŭre vendas festkandelojn kun surskriboj laŭ interkonsento.

La respondeculo de la libroservo krome kontaktiĝis kun diversaj publikaj bibliotekoj en Flandrio kaj Nederlando por konatigi al ili nian libromerkaton.

FEL regule sendas novaĵojn pri siaj eldonaĵoj al "Verbond van het Vlaamse Boekwezen" (Ligo de la Flandra Libro-industrio), kiu avertas la librovendistojn pri la novaĵoj sur la libromerkato.

2.10. ELDONOJ

2.10.1. Profite al la libroservo, E. D'Hondt eldonas dumonatan bultenon "Librovermeto" rilate al la plej interesaj verkoj kaj prezoj.

2.10.2. KATALOGO
G. Van Damme, oficisto ĉe GCA, kunmetis projekton de katalogo pri Esperanto-verkoj en Flandraj bibliotekoj.



Ni klopodos interesigi la Ministerion pri Kulturo cele al disvastigo en la publikaj bibliotekoj.

3. ĜENERALAĴOJ

3.1.1. FEL-estraro ellaboris planon, laŭ kiu ĝi estos ĉefe servo-organizo por sia membraro.
Por plifaciligi tion, ĝi ankaŭ reorganizis sian

3.1.2. Komitaton laŭ jena skemo:
- KUNORDIGADO - konsistanta el la prezidanto kaj sekretario
- FINANCOJ KAJ ADMINISTRADO, kiu same administras la komisionojn pri : TURISMO, TAKSI STOP kaj ELDONOJ
- INFORMADO + GAZETARA SERVO
- INSTRUADO - PROPAGANDO - EKSPOZICIOJ - KONGRESOJ
- GRUPA AGADO + RILATOJ KUN FLEJA + "OMBUDSMAN"

3.1.3. Je 22 01 1985 okazis en BRT-televida programo elsendo pri Esperanto en kiu ĉefrolis S-ro G. Maertens kaj F-ino K. Tytgat.

3.1.4. Ekde oktobro 1985 okazas en VUB Esperanto-kurso laŭ decido prenita en 1984 kaj en kiu rilato ne restis fremda S-ro E. Symoens por FEL.

3.1.4. Laŭ lastaj informoj okazas oficiala Esperanto-kurso en Provinca lernejo en Tienen iniciatita k. gvidata de S-ro Paul Kempeneers.

3.2. FEL-estraro ellaboris, je servo de la grupoj kiuj konsentas organizi kongreson, KONGRES-REGULARO-n

3.3. FEL akiris interesan ekspozici-materialon.

3.4. La estraro ankaŭ proponis adaptitan kotiz-aranĝon, kiu cetere intertempe jam estas aprobita de la ĝenerala kunsido kaj aplikota en 1986. Krom la normala individua kotizo, nomata baza kotizo, nun ankaŭ ekzistas familia kotizo je 3 X la baza kotizo samkiel dumviva membreco je 25 X la baza kotizo.

3.5. Antaŭ ol fini, ni menciu ankoraŭ ke, en la Kristnaska nokto 1984, okazis rompŝtelo en la Esperanto-domo.

3.6. Laste, sed ne malplej : en 1984 la financa situacio estis tre kontentiga.

JB.

------------------

# J U B I L E A   J A R O

Aldona raporto al BEF-ĝenerala jarkunsido de sabato 23-a de novembro 1985

Raportas A. Staes.

1. La Baza Libro pri Esperanto, verkita de W. Auld, estas preta kaj havebla ĉe UEA.
   Temas pri tiu libro, priparolata en "Kiu faru kion ?" de UEA kaj destinita al tradukado nacilingven.
2. UNESKO-rezolucio.
   En tiu ĉi rezolucio, pri kiu cetere ankaŭ temas en ESPERANTO de UEA kaj kiu ĉefe pritraktas instruan programon,ankaŭ temas pri poŝtmarko. UNESKO nome konsilas al la Ŝtatoj Membroj i.a. ankaŭ eldoni poŝtmarkon pri Esperanto. Do, la temo, kiu antaŭe jam estis rifuzita de la Internacia Poŝtunio, denove estas malferma kaj aktuala.
3. Internacia Patrona komitato.

3.1. En Belgio decidiĝis antaŭ kelkaj jaroj antendi la novajn elektojn en 1985 por klopodi kunmeti el la nova ministraro Patronan Komitaton.por la Jubilea Jaro.

3.2. Interesa punkto estas, ke UEA aldonos libron pri la Patrona Komitato kun biografio de la membroj. Tio signifas ke ni ne nur petu de la celataj personoj konsenton pri partopreno, sed samtempe biografion.
Kompreneble tio ĉi estas elemento prefere flata kaj do promesplena.

4. Kadrokursoj.
   AS prelegis pri (niaj) kadrokursoj en la UK en Augsburg. Li vendis tie 25-o da broŝuroj kun la kursotekstoj.
   Sekvis al tio interesiĝo flanke de vidersaj landoj.
5. Al la Broŝuro pri la Jubilea Jaro, kiu jam aperis, sekvos aldono antaŭ longe.
6. Grupa Agado.
   LA VERDA STELO invitis la urbestron de Antverpeno por prelegi en la klubo. Li akceptis kaj proponis daton en februaro 1986.
   Jen eble io interesa kaj sekvinda.de aliaj grupoj kun sufiĉe granda kvanto da membroj.

---



## Jubilea programo Loka Grupo en Belgio.

Tiun ĉi programon, por la preparoj al la jubileo en 1987, ellaboris Esperanto 2000 surbaze de la UEA-programo. Ĝi estas celata al disvastigo inter la lokaj grupoj en Belgio, tiel ke ĉiuj laboru en la saman direkton.

La programo estas ankoraù sufiĉe ĝenerala, sed provas klare emfazi kelkajn el la multaj farindaj eroj.

(La numeroj inter krampoj estas paĝonumeroj en la broŝuro de UEA pri la jubilea programo. Tamen ne necesas havi tiun).

### 1. Ne por la lokaj grupoj.

(6, 7) organiza formo = nenio speciala por 1987
(9, 10) rimedoj : krom tiu de BEF ne necesas speciala fonduso por la jubileo. Oni ellaboru la daùrajn enspezofontojn
(12, 13) monda komunika jaro : finiĝis jam
(14, 15) kongresoj, kunvenoj = UEA
(17, 18) kunvenoj fakuloj = UEA
(19, 20) eldona agado = UEA
(24) koresponda universitato = UEA

### 2. Daùra agado, iom pli intense en 1987.

(26, 27) simbolo : ekuzenda en propra simbolo de la grupo (Eo2000 jam tion realigis), en esperantaĵoj diversaj, sur titolpaĝo de revuoj (Panoramo, Informilo, loka revuo)
(30, 31) dissendu almenaù unu gazetaran komunikon al kiom eble plej multaj (lokaj, naciaj) gazetoj kaj radiostacioj pri la planoj por 1987

### 3. Ĝeneralaĵoj.

(29) bierkartetoj (Artois, Aalst, ... : FEL ?)
poŝtkarto afrankita, poŝtmarko = nacia (FEL)
poŝtŝtampo = loka afero. Kiu loka grupo faros konsilaron (t.e. petu informojn ĉe la poŝtservoj kaj dissendu tiujn al la aliaj grupoj) ?
Esperantostrato : ĉiuj lokaj grupoj en lokoj kie ne jam estas tia strato.

### 4. Informmaterialo preparinda.

#### 4.1. Gravega

(21) Jubilea numero 'Esperanto' en la nederlanda : Eo2000 volonte ĝin tradukos se estas en ordo sufiĉe frue en Eo. FFL ĝin presu kaj ĉiu loka grupo (inkl. Eo2000) aĉetu ĝin almenaù 100-ekzemplere (por kursoj, gemembroj, foiroj, ...)

4.2. Inda, sed ne nepre necesa

(22) baza libro pri Esperanto, verkoj Zamenhof : ĉu farata jam ? FEL ĝin iniciatu, petu mem kunlaboron de loka grupo aŭ individua esperantisto
Rim. : Esperanto 2000 ricevis la rajton reeldoni 'basisgegevens over de Int.taal (Esperanto)'. Havebla je 10,- po.
(23) historio de loka Esp.omovado. Por Leuven farata ; ĉu aliaj, krom belga antologio ?
(25) materialo por lernejoj : FEL iniciatu. Sufiĉe grave, uzota de ĉiuj lokaj grupoj por la lernejoj en la regiono
(-) artikoloj en 'autotoerist'(VTB/VAB) : FEL

5. Aranĝoj gravaj.

(16) lokaj festoj : loka grupo, se eble organizataj de urbo. Leuven : Gambrinusfestoj pri 'Esperanto' ?, lingvoborso, folkloraj paskfestoj pri Esperanto ...
(28) ekspozicio : gravega. FEL ĝin faru, kun aldonoj eblaj de la lokaj grupoj. La grupo trovu okazon por montri ĝin en ekz. biblioteko, lernejo, butikcentro, ...
(-) ĉu eblas organizi konkurson inter-lernejan pri Esperanto ? Necesas tiam valoraj premioj (20.000,- ?); ĉu ebla ?

6. Ekspluatado de la atingoj.

Tiu punkto ankaŭ jam nun estas prilaborenda ...

(11) FEL : esploru kurslibrojn (ĉu ILEI faros tion ?)
loka grupo : la kunvenoj taŭgu por komencantoj (por Leuven : Vesperoj 2000) kaj por plispertuloj ; novaj membroj se eble aranĝu mem parton de ili
gravega : ni bezonas instruistojn por gvidi kursojn post la 1987-reklamo. Por Leuven : 2 ĝis 3 samtempaj kursoj, kurso Tienen, rapidkursoj.

7. Fina rimarko.

La loka grupo jam nun :
- preparu la agadon : kontaktoj kun aliaj instancoj, k.s.
- indiku kunlaborantojn inter siaj gemembroj kiuj ellaboru po unu aŭ kelkajn erojn, sufiĉe memstare

Atentu ke plej multaj eroj estu pretaj komence de 1987, t.e. post malpli ol unu kaj duona jaro ...

La supra programo ne estas teoria babilado. Esperanto 2000 jam komencis la realigadon. Ankaŭ vi priparoligu la programon en la propraj estrar- kaj grupkunvenoj kaj ekrealigu ĝin laŭ viaj propraj prioritatoj. Sukceson ...